

# Esperanto kaj UN



## Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 71, julio-aŭgusto 2024

Universala Esperanto-Asocio



## Festu Esperanto-Tagon, 26 julio 2024

Landoj havas siajn naciajn festotagojn, kiam oni flirtigas flagojn, organizas paradojn, kaj abunde manĝas niacajn pladojn. Ni kantas kantojn en niaj naciaj lingvoj kaj citas niajn naciajn verkistojn. Ni fieras aparteni al nia nacio.

Esperanto ja ne estas nacio: la internacia lingvo Esperanto estas parolata de homgrupoj tra la tuta mondo. Sed ni ja festas nian specialan tagon. Esperanto-tago estas la 26a de julio, la dato kiam, en la jaro 1887, aperis la unua lernolibro de Esperanto – fare de Ludoviko Zamenhof, en la tiutempa Rusio, la nuntempa Pollando. Temas pri tago por festi la Internacian Lingvon!

Ĉiujare oni desegnas kaj distribuas specialan afiŝon – en dekoj da lingvoj (rigardu ekzemplon ĉi-supre). Lokaj kluboj aranĝas kunvenojn, oni aranĝas festajn verspermanĝojn, oni donas petskribojn al lokaj instancoj, lernejoj kaj naciaj organizoj. Foje oni ankaŭ engaĝas registarojn.

Skribante en lastatempa numero de la revuo *Ondo de Esperanto*, iama prezidanto de Universala Esperanto-Asocio d-ro Renato Corsetti memorigas pri la unuaj deklaroj de Zamenhof pri sia lingvo,

eldiritaj en la fruaj tagoj de ĝia eldoniĝo. Tiutempe, rimarkas Corsetti, Zamenhof aludis al glavoj “sangan soifantaj” dum nacioj konfrontiĝas kun aliaj nacioj. Hodiaŭ, li atentigas, ne plu temas pri glavoj sed pri droneoj, kiuj minacas la naciojn: daŭras la minaco, sed ĝia detrukapablo estas multe pli granda.

Ni alvokas al ĉiuj homoj, ke je 26 julio ili pensu dummomente pri mondo en kiu egaleco de parolo anstataŭu perforton, kaj internacia lingvoj fariĝu komunikilo por serĉi komunan grundon inter ĉiuj homoj – en etoso de egaleco.

Ĉu nur utopia vizio? Eble – sed hodiaŭ milionoj da homoj (sen troigo) uzas Esperanton por interkomunikiĝi, amikiĝi trans naciaj limoj, komerci kune, kaj labori por tio kion homoj kiel Corsetti nomas “epidemia de komuna saĝo.” Kunfestu kun ni!



## Finaj planoj pretiĝas por la Universala Kongreso de Esperanto 2024, en Aruŝo, Tanzanio

Reprezentantoj el pli ol kvardek landoj alvojaĝos al Aruŝo, en Tanzanio, por partopreni la nunjaran Universala Kongreson de Esperanto, la 109-an en serio kiu komenciĝis en la jaro 1905, kiam la unua tia kongreso okazis en Bulonjo-sur-Mar, Francio. La nunjara temo, “**Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo**” aparte fokusiĝos je Afriko kaj je la rilato inter daŭripova evoluigo unuflanke kaj lingvoj aliflanke. En la kongreso okazos regulaj kunsidoj de la gvidaj organoj de Universala Esperanto-Asocio, sciencaj prezentoj, kaj teatraj kaj muzikaj spektakloj.

La nove fondita komisiono de UEA pri virinaj aferoj okazigos sian duan kunsidon, sub gvido de kvarpersona organiza komitato, el Ĉinio, Kubo, Madagaskaro kaj Pollando. Ankaŭ planata estas speciala renkontiĝo de afrikaj virinoj por pridiskuti Esperanton en Afriko kaj la manierojn laŭ kiuj ĝi povas kontribui al daŭripova evoluigo.

La kongreso ankaŭ ricevos raporton de Anny Joanice (Burundo) kaj Mana Brinson (DR Kongo), kiuj reprezentis Universalan Esperanto-Asociacion en la lastatempa 69-a Civilsocio Konferenco de UN, en Najrobio.

Kunordigos la kongresan temon François Hounsounou (Benino). Por kontakti la kunordigan teamon, skribu al [KongresaTemo@groups.io](mailto:KongresaTemo@groups.io).

## Rifuĝintoj: Voko alfronti kreskantan tutmondan problemon

En forte vortumita mesaĝo okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20-a de junio 2024, Universala Esperanto-Asocio alvokis al renovigita atento, fare de registaroj kaj neregistaraj organizoj, al la tutmonda problemo de homa dislokigo, precipe al la lingvaj bezonoj kaj lingvaj rajtoj de rifuĝintoj.

“Rifuĝintoj estas inter la plej vundeblaj homoj de nia hodiaŭa mondo,” komenciĝis la deklaro de UEA. “Krom fuĝi el persekuto, teroro, konflikto aŭ katastrofo, ili ofte ankoraŭ frontas danĝerojn survoje al rifuĝo kaj en la regionoj kie ili serĉas sekurecon. Tamen, rifuĝintoj estas homoj kaj havas homajn rajtojn: ili rajtas rekonstrui siajn vivojn.”

“Kune ni povas garantii ilian sekurecon kaj subteni ilian ekonomian kaj socian inkluzivon. Kaj kune ni povas labori por elimini la kialojn de ilia fuĝado,” la deklaro asertas.

“Solidareco estas la ŝlosilo: en gastigaj landoj, solidareco por ricevi rifuĝintojn kaj helpi ilin prosperi en la nova komunumo; internacie, solidareco por helpi fini konfliktojn kaj ripari naturajn katastrofojn, rekonstrui landojn, kaj subteni gastigajn landojn per bezonataj rimedoj.”

“La sperto esti rifuĝinto kaŭzas profundan senton de senpoveco,” la mesaĝo de UEA atentigas, citante la sperton de la filozofo Hannah Arendt, mem rifuĝinto: “Ni perdis nian hejmon, kio signifas la familiarecon de ĉiutaga vivo. Ni perdis nian okupon, kio signifas la memfidon, ke ni iel utilas en ĉi tiu mondo. Ni perdis nian lingvon, kio signifas la naturecon de reagoj, la simplecon de gestoj, la senafektan esprimon de sentoj.” [Arendt, *We Refugees* 1943]

“Ĉar lingvo estas tiel baza en homa vivo,” la mesaĝo konstatas, “ĝi devas ricevi specialan atenton. Kie komuna lingvo mankas, la lingvo estas ofte la ĉefa baro por rifuĝintoj; kie komuna lingvo ekzistas, ĝi povas esti malferma pordo kaj vojo al plena integrado. Ni pledas por urĝa atento al lingvaj homaj rajtoj de rifuĝintoj. Same kiel ĉiuj aliaj homoj, ili rajtu uzi siajn lingvojn, kaj rajtu lerni, aliri servojn, kaj partopreni publikajn diskutojn per siaj gepatraj lingvoj. Krome, ili rajtu lerni la lingvojn de sia nova hejmo.”

“Kiel komunumo de parolantoj de la internacia lingvo Esperanto,” la mesaĝo konklude deklaras, “ni strebas por faciligi komunikadon, plifaciligi rilatojn inter homoj, kreskigi fortikan senton de solidaro kaj disvolvi komprenon kaj estimon.” La mesaĝon oni transdonis al Unuiĝintaj Nacioj pere de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN kaj oni cirkuligis ĝin al novaĵaj fontoj tra la mondo.

---

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org).